

AVENO # 48 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj - 2022

Jen gheeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj .
Diversaj peticio-petoj trovighas je Ekologio au je Homaj Rajtoj

Proponita kotizo por AVE estas: 10 EUR jare, pli au malpli eblas.
Nia UEA-Konto: avex-z;
Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Breisgau, Germanio
Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>
Nia eta interreta diskutejo trovighas je Ipernity, tie serchu la grupon "Verduloj"

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur www.verduloj.org) kaj la Charton de GlobalGreens.org - asocio de tutmondaj verdaj/ekologiemaj partioj, 2014.

Nova informejo: kern.punkto.info/arkivo/

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ... La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)

01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)

02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo

03-08 : Internacia Tago por Virinoj

03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto

03-21 : Tago de la Mondcivitanoj

03-22 : Internacia Tago por la Akvo

04-20 : Tago de la Tero

05-09 : Europa-Tago

05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita ŝtato Israelo (1948)

05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo

06-08 : Tago de la Maroj

06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj

11-25: Internacia Tago malhelpi perforton kontraŭ virinoj kaj knabinoj

===

2022-05-18 Eliri el la malriĉeco - ekzemplo en Madagaskaro - kolekto por 3 projektoj

Jen informo filmeto (12 min, en 5 lingvoj) pri produktado de bio-karbo - do, ligno-karbo el plantaj defalajhoj - por savi la arbojn;

krome ili montras pli efikan kuir-fornon kiu reduktas la bezonon da ligno-karbo, sed mem produktas bio-karbon.

Same temas pri salubra akvo, kaj malsano-asekuro, uzante la reton.

<https://www.arte.tv/fr/videos/097253-000-A/madagascar-sortir-de-la-pauvrete/>

<https://www.arte.tv/de/videos/097253-000-A/madagaskar-neue-wege-aus-der-armut/>

(subtitolita: en, es, it, pl) <https://www.arte.tv/en/videos/097253-000-A/arte-reportage/>

Chi-kaze ni havos projekton de niaj geamikoj en **Rumonge / Burundo**:

Ili petas de SEZ Burundi en Baden-Virtembergo subtenon por produkti pli efikajn kuir-fornojn - unue por la gepatroj de la infanoj en la "Ecole Maternelle Espero" en Rumonge. Vi certe scias ke en Afriko oni ofte uzas lignokarbon por kuir. Bedaurinde same ofte neniu respondecas pri replantado de arboj. Post la arbo-gardeno (kie la arboj helpas eviti erozion) ili volas realigi pli ol 100 pli efikaj kuir-fornoj, por redukti la bezonon da ligno-karbo, krome ilia projekto enhavas la produktadon de bio-karbo (similas al ligno-karbo sed estas produktata el defalajhoj, ekz-e pishtoj

de majzo, ktp). Por ricevi la subtenon ili (subtenata de ni) bezonas minimume 15% de propra kapitalo, do, ch. 2000 Euro. Malgrandan parton ili povas aldoni mem - en formo de libervola laboro.

La alia projekto estas en **Kalima, DR Kongo**, kie Etienne - organize subtenata de SBV en Goma - jam sukcesis realigi kvartalajn akvokranarojn por pli ol 40.000 homoj. Ankoraŭ restas ch. 16.000, kiuj parte ankau uzas la ekzistantajn kranarojn, sed havas pli longan vojon. Ni dankas al subteno de 7 mil Euro kiun ni ricevos de fonduso de la dungitaro de la germana firmao Bosch, kiu produktas elektr(on)ikaj aparatoj, ktp.

Ankau tie estas kondiĉo de propra partopreno. De Kalima mem venos 1 mil (el kolekto de la jam ekzistantaj kranaroj), kaj de ni samideanoj ankau venu 1 mil Euro.

Finfine - se iu preferas subteni nian samideanon **Henriel en Madagaskaro** por sia projekto de restauracio kiel ebleco varbi por Esperanto eblas pagi ankau al la UEA-konto de AVE: avex-z

Bonvolu vidi la du kontojn je la fino de nia - alkrochita - lasta informilo pri la per-Esperanto-Agado de AVE (chi-tiuj novaj projektoj ankoraŭ mankas tie). Ne nur loĝantoj en Germanio, sed ankau en tuta EU povas uzi la kvitancojn por redukti siajn imposto-pagojn. Se vi volas havi kvitancon bonvolu aldoni vian adreson - au skribu al mi por pludoni ghin al tiuj asocioj. Se vi estas membro de UEA, kaj ne bezonas imposto-kvitancon vi povas rekte transpigi al nia UEA-konto: avex-z Chi-kaze mi rememoras ke la jara kotizo por AVE estas 10 Euro.

Por Kalima: al Direkthilfe Freiburg e.V.
www.direkthilfe-freiburg.de
IBAN: DE58 6809 0000 0009 4430 02
BIC: GENODE61FR1, Rimarko: „Kalima ...“

Por Rumonge: al BAVELO - www.esperanto-bw.de
IBAN: DE21 6945 0065 0010 4179 22,
BIC: SOLADES1VSS , Bonvolu noti: „Rumonge ...“

Anticipan dankon kaj bondezirojn al vi,
amike, manfred

= =

Helpu kurson de Esperanto en afrika universitato sen elektro

En Kongo ne funkcias poŝtaj servoj [se vi volas ricevi leteron, vi devas sendigi ĝin al via amiko en apuda lando] kaj ne estas publika elektro-sistemo, sed ankaŭ en tiaj kondiĉoj oni sukcesas instrui Esperanton. La universitato *Espoir*, UEC, en orienta Kongo ĉe la lago Tanganiko danke al la helpo de esperantistoj, pere de AVE, kaj al la subteno de ILEI sukcesis instali sunpanelojn por provizi elektron al unu klasĉambro [ĉar rompiĝis la malnova petrola elektro-generilo], kaj en tiu klasĉambro per komputilo eŭropa instruistino,

Francoise Noireau, ĉiun sabaton prezentas per Zoom lecionon pri Esperanto kaj poste per retaj mesaĝoj korespondas kun la lernantoj kaj korektas la hejmtaskojn. La lernolibroj estis donaco de Esperanto France. Ĉu ĉio en ordo en la plej bonaj el la mondoj? Jes kaj ne, ĉar nun oni devas instali pliajn sunpanelojn por havi pli da elektro kaj necesas instali en la klas-ĉambrom grandan ekranon por projekciado de la leciono por ke la lernantoj sekvu ilin pli facile ol per siaj poŝtelefonoj.

Ahmad Reza Mamduhi tie prezentas Esperanto-Kursaron "Tibor Sekelj".

Jen la aktuala informo pri UEC: https://eo.wikipedia.org/wiki/Universitato_Espero_de_Kongo

Alkrochite vi trovos la aktualan informon de UEC*

Tie vi trovas ligilon al la retejo de UEC kiu validas ghis 2017. Intertempe, 2021, nia samideano **Byelongo Elisee Isheloke** iĝis rektoro de UEC - nun ili ofertas ankaŭ Esperanto-programon. Dank al pluraj subtenantoj Elisee povis instaligi PV-modulojn kiuj jam helpas pri la bazaj bezonoj, lumon kaj kurenton por ŝargi bateriojn de posh-komputiloj. Ghis nun la prezentajhoj por la Esperanto-lecionoj aperas nur sur la ekranetoj de tiuj posh-komputiloj.

Por pli bone prezenti ilin la instruantoj kaj Elisee petas subteni la aĉeton de granda ekraneto. Li kalkulis 400\$.

Kaj jen informo pri najbara urbo Kalemie* en Esperanto, tie estas mencio de Baraka. Pli detalajn informojn oni vidas en la franca vikipedio.

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kalemie>

[https://fr.wikipedia.org/wiki/Baraka_\(r%C3%A9publique_d%C3%A9mocratique_du_Congo\)](https://fr.wikipedia.org/wiki/Baraka_(r%C3%A9publique_d%C3%A9mocratique_du_Congo))

Renato Corsetti petas subteni chi-tiun investon en pli bona instru-medio: denove mi apelacias al via esperantista koro por ke vi helpu la instruadon de Esperanto en senesperaj materiaj kondiĉoj en la urbo Baraka. Trovu ĝin sur la mapo kaj donu esperon al junaj afrikanoj, kiuj volas plibonigi sian kaj nian mondon.

Jen la konto de AVE che UEA: avex-z, bonvolu noti "por PV de UEC"

Se vi ne estas membro de UEA bonvolu pagi al mia persona konto - ĉar de tie mi transpagos (UEA ne emas/povas fari troan laboron).

Manfred Westermayer, Bonn; Konto: Volksbank Freiburg, BIC GENODE61FR1, IBAN DE31 6809 0000 0007 8681 11 .

Anticipan koran dankon, bondezirojn, amike,

Elisee & Renato, la instruistoj Fransoazo & Ahmad, kaj Manfred (la kolektanto)

*) Mi pardonpetas por tiom granda dosiero, sed ankoraŭ ne ekzistas la aktuala retejo

= =

2022-03-26 Jara raporto de AVE - kaj peto

Karaj AVE-anoj kaj subtenantoj de nia Per-Esperanto-Agado en Afriko, chi-foje mi aldonas la financon raporton de AVE por 2021, kaj la koncizan raporton pri nia per-Esperanto-Agado.

Pri nia kunlaboro kun la Verdaj Partioj: chefe agadas niaj francaj geamikoj ene de EELV. AVE restis en kontakto kun GlobalGreens.org kaj kun EuropeanGreens.org - sur iliaj retejoj trovighas iliaj chartoj ankaŭ en Esperanto:

Ankaŭ en multaj lingvoj: <https://globalgreens.org/about/charter/>

En 24 lingvoj: <https://europeangreens.eu/charter>

Chi-jare mi kontaktis la Federacion de Verdaj Partioj en Afriko.

Aktuale kaj estonte:

En Marto au Junio 2023 okazos la sekva Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj en Seulo, Republika de Koreio. Mi pretas partopreni persone se 2 au 3 ge-samideanoj (ne chiu devas esti membro de Verda Partio) kune partoprenos; ni povas havi informtablon kaj eble oferti laborgrupon pri lingva politiko.

Aktuala peto:

Mi petas denove, subteni la ankoraŭ mankantan reston de kotizo por mezlernejo (por 7 gejunuloj) au universitato (ankaŭ 7 gejunuloj) en Goma/Norda Kivuo, DR Kongo. Por 3 ni jam trovis subtenantojn - vidu la alkrochitan dosieron, kiu montras ankaŭ iliajn studobjektojn - kaj kiom mankas nun. Sub la tabelo vi trovas 3 ligilojn al video-filmetoj de Alphonse, kiuj montras ilin (plejparte) - kaj en la lasta kolono vi povas vidi kiu parolas en kiu tempo-spaco. Chiu parolas Esperanton, kelkaj flue.

Vi povas elekti unu el ili, au simple subteni ĝenerale (10, 20 au 40 Euroj) jam helpas ;)

Ili apartenas al tiuj orfoj au duonorfoj kiuj estas subtenataj de SBV (Societo de Bona Volo), kion organizas surloke Alphonse WASEKA. Jen ilia nova retejo - nur kelkaj el "niaj" trovighas tie.

<https://www.bonvolo.net/copy-of-studontoj-sercxantaj-subtenon>

AVE subtenas ilin en kadre de nia Per-Esperanto-Agado. Krome, sen Alphonse ni ne povintus realigi "nian" grandan projekton Akvo por Kalima (bonvolu vidi la alkrochitan informilo) SBV-lernantoj,)

Mi denove dankas al tiuj malmultaj kiuj jam subtenis la kotizojn de chi-tiuj gejunuloj. Sed ankoraŭ ne sufichas, kaj ankaŭ miaj personaj rimedoj estas limigitaj.

La konto de AVE che UEA: avex-z, bonvolu noti "kotizo por SBV, kaj vian nomon

Se vi ne estas membro de UEA bonvolu pagi al mia persona konto:

Mi transpagos komence de Aprilo al SBV (UEA ne emas/povas fari troan laboron).
Manfred Westermayer, Bonn, Konto: Volksbank Freiburg, BIC GENODE61FR1,
IBAN DE31 6809 0000 0007 8681 11 .

Anticipan koran dankon, bondezirojn, amike,

Manfred

- - -

2022-03-22 Financa raporto de AVE (chio en Euro) por 2021:

En 2021 AVE ricevis membrokotizon 220 (5 au 10 Euro) de 24 membroj.

Char mi ne kalkulas miajn proprajn elspezojn AVE mem bezonis nur 44 Euro, nia kotizo por UEA. Dank al pluraj - ankaŭ ne-AVE-anoj - ni ricevis donacojn (inter 10 kaj 7000) de 13.595 - por subteni nian per-Esperanto-Agadon (14.173) . Sed ne eblas atendi simile multe.

Mi ne al-kalkulis la rektajn subtenojn por "Akvo por Kalima" al la asocio "Direkthilfe" en Freiburg, kaj por nia subteno al Burundo (ANEB, infanhardeno en Rumonge, ilia agro-forstado), kiu estas organizata de "BAVELO", Esperanto-Ligo de Baden-Virtembergo.

Dank al tiuj NRO-oj ni ankaŭ povis ricevi subtenojn de firmaoj (subtenfondusoj de dungitaro de Bosch kaj de Daimler), kaj de ŝtata fonduso.

- -

2022-02-25 Per-Esperanto-Agado: Akvo por Kalima 2022 - 3 novaj kvartalaj kranaroj hodiaŭ ni ricevis de la ŝtata fonduso finfinan akcepton de nia financa kaj ĝeneralaj raportoj pri la plej granda projekto de AVE enkadre de nia Per-Esperanto-Agado - mi jam raportis. Nun la plej granda projekto de nia per-Esperanto-agado estis finita (2020 ni subtenis tion per pli ol 70 mil Euro): bona trinkakvon por ch. 18.000 homoj en Kalima /DR Kongo.

Aktuala projekto:

Ankorau 14.000 atendas pli bonan akvo-kvaliton kaj pli proksiman provizon, kaj PIEADC plejparte povos realigi pliajn pashojn. Koran dankon al chiuj kiuj kune laboris, pripensis kaj donacis. La plej granda donaco, ch. 50 mil, venis de la germana registaro (ministerio pri ekonomia kunlaboro) fakte organizata de privata fonduso EZ-Kleinprojekte. Aliaj grandaj subtenantoj estis fondusoj de dungitoj de germanaj firmaoj (Robert Bosch kaj Daimler AG - chi-tiu firmao eĉ duobligis la sumon de la dungitaro) kaj sen la kunlaboro de germanlingva asocio Direkthilfe für Kleinprojekte e.V. ni eĉ ne havus la eblecon peti tiajn subtenojn.

Finfine ankaŭ multaj el VI subtenis, char propra kontribuo ĉiam necesas por atingi tiajn subtenojn. Koran dankon al chiuj :)

= = =